

ESPERANTO PROVENCE

Numero 93 - Somero 2013
www.esperanto-provence.org

4 numeroj/jare
www.facebook.com/esperantoprovence

redaktoro:
Pascal Vilain
p.vilain83@orange.fr
61 montée du Castelar
83460 TARADEAU

kasisto:
Michel Cerisay
mcerisay@gmail.com
15 Place des Vents Provençaux
13140 MIRAMAS
baza kotizo al la Federacio (kun bulteno): 5 eŭroj

Uorto de la Prezidanto

Denove finiĝis la studperiodo kaj niaj diversaj kursoj.

Estas momento por taksi niajn proprajn progresojn ! Ĉu pozitivaj aŭ ne ?

Por tion konstati mem, ni elektu, se eblas : ĉu vojaĝi por renkonti samideanojn, ĉu gastigi esperantistojn, ĉu - se ni dubas pri nia nivelo - provi plibonigi ĝin en Greziljono, Kvinpetalo,

Pluezek aŭ aliaj staĝejoj : ĉiuj tiuj lokoj ebligas ja studi kaj renkontiĝi kun multe da eksterlandanoj por agrable babili en internacia etoso.

Do... ek al plua uzo de nia ŝatata komunikilo...

Agrablan someron al ĉiuj membroj de la federacio « *Espéranto-Provence* » !

Pierre Oliva

Communication équitable

En 2013, les locuteurs de l'espéranto feront campagne pour une justice linguistique sous le slogan « Communication équitable », en relation avec le 98^e Congrès Universel de l'Espéranto qui se tiendra sur le même thème dans le prestigieux Centre Harpa de Reykjavik, en Islande, avec la participation de quelque 1.000 participants de plus de 50 pays.



Après une courte période de 125 ans, l'espéranto se trouve actuellement parmi les 100 langues les plus utilisées, sur les 6.800 idiomes parlés de par le monde. Sur le site de Wikipedia, il arrive en 30^e position parmi 285 langues (11 février 2013). Il se

trouve aussi parmi les langues retenues par Google, Skype, Firefox, Ubuntu et Facebook. Google Translate, le programme de traduction de Google, l'a récemment ajouté à sa liste de 64 langues. De même les téléphones mobiles

digitaux peuvent aujourd'hui utiliser l'espéranto.

L'espéranto est enseigné officiellement dans 150 universités et autres instituts d'enseignement supérieur, ainsi que dans quelque 600 écoles élémentaires et secondaires dans 28 pays. Sa littérature comporte plus de 50.000 titres, et chaque semaine sont édités de nouveaux ouvrages littéraires. Il existe aussi des émissions radiophoniques podcast dans plusieurs pays, sans compter « Radio Muzaike » qui émet 24 heures sur 24 et un programme télévisé en Chine sur Internet.

La diffusion de l'espéranto est freinée par le manque de connaissances objectives sur le sujet, ainsi que par bien des préjugés. Sans compter les persécutions dont furent victimes ses locuteurs, par exemple sous Hitler et Staline ; tous deux ont disparu, mais l'espéranto est resté, a évolué et, actuellement, il est activement utilisé comme moyen de communication inter-ethnique, interculturel, par des milliers et des milliers de personnes dans plus de 100 pays sur tous les continents.

L'UEA (Universala Esperanto-Asocio / Association Universelle d'Espéranto) a des relations officielles avec l'UNESCO et les Nations Unies, de même qu'avec le Conseil de l'Europe. L'espéranto permet une communication inter-ethnique neutre et un niveau de discussions,

d'intercompréhension équitable, respectant ainsi les droits des minorités et des langues autochtones, en traitant tous les idiomes sur le même pied d'égalité et en respectant les diversités culturo-linguistiques de tous les locuteurs.

Voir aussi : <http://www.droits-linguistiques.org/>

IFEF & UFE – kongresoj en Artigues

6 anoj el nia federacio partoprenis en la kongresoj de UFE kaj IFEF, kiuj okazis samloke kaj parte samtempe en *Artigues* (Bordozió).

Jen pria raporto :

El la taglibro de baza kongresano en Bordozió

De la kvina ĝis la dekunua de Majo, okazis la kongreso de la Fervojistoj (IFEF – Internacia Fervojista Esperantisto-Federacio, kun Rodica Todor ĉekape). Parte samtempe, de la 8^a ĝis la 10^a, UFE okazigis sian jaran kongreson en la sama loko. La kuniĝo de ambaŭ federacioj ebligis pli gravan kaj pli facilan aperigon de diversaj kulturaj manifestacioj. Sed pro la granda nombro da prelegoj, kunsidoj, asembleoj... ne eblis ĉeesti ĉiujn.

Pri la libroservo zorgis UFE, kiu sendis multajn presitaĵojn por vendi al la dezirantoj. « La templo de l'suno » (lasta tinĉjaĵo) bone disvendigis.

La kongresoj disvolviĝis en la bela kadro de la *Maison de la Promotion Sociale*. en *Artigues-près-Bordeaux*. Kelkaj partoprenantoj loĝis en la hoteldomo de la *Maison*, kaj aliaj ricevis ĉambron en apuda hotelo, proksima al la kongresejo. En tiu ĉi sama loko okazis la IFEF-kongreso antaŭ ses jaroj, kaj oni devas agnoski, ke la diversaj laborĉambroj plus la granda salono estas aparte taŭgaj por okazigi tiaspecan renkontiĝon.

Entute partoprenis pli ol 250 kongresanoj el 18 landoj. Multaj homoj venis el la orienta parto de Eŭropo : Hungario, Bulgario, Rusio... La etoso estis do tre multkolora kaj varma. El nia suda-orienta franca regiono ĉeestis ses personoj.

La loĝkondiĉoj estis tute agrablaj : dormoĉambro kun dupersona lito kaj apuda banĉambro (kun duŝejo, necesejo kaj lavujo. La restoracio (bufedo) troviĝis en aparta kons-

truaĵo. La bankedo okazis kun bongusta manĝa elekto. La posta balo daŭris ĝis noktomezo.

La solena malfermo okazis dimanĉe matene, la 5-an de Majo. La granda salono (ampleksa salono kun sidŝtupara sistemo kaj grandega scenejo) estis preskaŭ plena.

Ĝeneralaj asembleoj de fakaj asocioj okazis en diversaj tagoj kaj salonoj. Ĉiuj tiuj okazaĵoj estis detale menciitaj en la kongreslibreto.

La kulturaj aranĝoj estis tre diverstipaj kaj malsimilaj : mi prelegis dum du horoj pri « La Libro de la Mil kaj Unu Noktoj » kaj pri ties malkovrinto, *Antoine Galland*, kaj tradukoj al la franca. La fervojistoj delegis unu sian fakulon (*Michel Lafosse*) por paroli pri la tramsistemo en Bordozió : tre interesa enkonduko en tiun sistemon, eĉ por la nefakuloj !

Okazis ankaŭ vesperoj kun kantoj, kun teatraĵoj, kun folkloraj okcitanaj dancoj far la grupo *Maragan...*



IFEF & UFE – kongresoj en Artigues

La grupo Interkant' prezentis al ni la plej mondfaman operon Karmen' kun la solistino *Zdravka Bojčeva* – ĉio tio sub la gvidado de Franjo *Lévêque* (ĥorestrino kaj instigantino de la projekto). La Kompanoj – kanta kaj teatra trupo de *Espéranto-Gironde*, proponis sian spektaklon « La sekreto de la magia trajneto » : tute suprizaj kaj poeziplena vojaĝo ! *Marcel Redoulez* estis la multfaceta aganta koboldo de pluraj tiuj kulturaj aranĝoj.

Mi nepre ne devas, kaj eĉ ne povas, forgesi niajn du amikojn de la ensemblo « Kajto » (*Ankie* kaj *Nanne*). Kiel kutime ili ravis nin per siaj kantoj kaj belaj voĉoj. Plurfoje ili kantigis la ĉeestantojn, kiuj volonte partoprenis tiun komunan kontakton.

Tuta programo da vizitoj estis proponitaj al la dezirantoj : pieda aŭ aŭtobusa vizito de la urbo Bordo ; vizito de la tramgaraĝo de la bordoza tramsistemo ; vizito de la fortikaĵo *Blaye* (far *Vauban*) ĉe la enfluo de *Ĝirondo* en la oceanon ; vizito al la « baseno de *Arcachon* » kun nepra grimpadado sur la dunon de *Pilat*, vizito de la muzeo de « *Marquèze* » kaj dezirantoj havis la

eblecon viziti vinajn kelojn. La lasta ekskurso, de kiu oni atendis multon, pro diversaj kaŭzoj ne tre bone efektiviĝis : ĝi devus esti krosado, sabbate la 11-an, sur la rivero *Ĝirondo*, sed ĝi fine sumiĝis al tranavigado de la rivero (kaj revene) por atingi la insulon Patiraso meze de la fluo. Tamen sur la insulo atendis nin tre originala restoracio, kiu proponis al ĉiuj starantan bufedon kun, kompreneble, vino de *Médoc*. La geKajtoj akompanis nin dum la tuta ekskurso. Dum la manĝado ili ĉarmis nin per siaj kantoj kaj kantigis multajn.

Kelkajn vortojn pri la vetero, kiu ĉiam estas grava elemento de tiaj renkontiĝoj : ni ĝuis sunan veteron spite du pluvajn tagojn, kiuj ne vere ĝenis nin.

La solena fermo okazis unu tagon antaŭ la fino, ĉar multaj kongresanoj devis forveturi iomete pli frue pro diversaj personaj kialoj.

Entute, tre agrabla(j) kaj sukcesa(j) kongreso(j), bone organizita(j) kaj prizorgita(j) de niaj amikoj esperantistoj. Brave al ili, kaj dankegon pro ĉio.

raportis Daniel Moirand

El niaj federaciaj asocioj

Asociaj forumoj

La fino de la somegra sezono estas tradicie stampita de multaj asociaj forumoj.

Jen listo de tiuj, en kiuj partoprenos niaj Esperantaj kluboj (ĉiuj en Septembro) :

la 7an : La Ciotat (13) - port

la 8an : Marseille (13) - Parc Borély

la 7an kaj 8an : Embrun (05) - Foire Généri

la 14an : Le Beausset (83) - Gymnase du Collège Giono – 9h/17h

la 14an kaj 15an : Fréjus (83) - Fête du sport et des associations à la Base Nature

Prelegturneeto

Franca samideanino loĝanta nun en Aŭstralio : *Franciska Toubal*, estos en nia regiono por kelkaj tagoj, invitite de *Monique Arnaud*, kaj prelegos pri diversaj temoj en kelkaj el niaj asocioj.

Jen la datoj :

22a de Septembro en Aix-en-Provence (13)

23a : Marseille (13)

26a : Manosque (04) - okaze de la Tago de la Eŭropaj lingvoj

27a : Gap-Saint-Bonnet (05)

Pli da informoj ĉe la respektivaj kluboj.

04 - ESPERANTA KULTURO EN MANOSQUE

Le jeudi 23 mai 2013, EKEM-04-Esperanto a présenté l'Espéranto dans l'amphithéâtre de l'École Internationale de Manosque, devant une quarantaine d'élèves trilingues de niveau BAC. Il y avait aussi dans l'auditoire le Directeur-adjoint, la documentaliste responsable de la médiathèque et quelques professeurs.

Cette école est mondialement connue car elle accueille aussi les enfants des techniciens de trente nationalités, venus pour le programme ITER dans la région de Cadarache, proche de Manosque.

La quarantaine de présents étaient tous volontaires et attentifs. Notre ami Patrick avait préparé la conférence avec un support "vidéo-projection".

Nous avons eu le plaisir d'entendre une professeure de Chinois, dont la mère est espérantiste, intervenir très favorablement pour notre langue internationale.

Les questions posées par les élèves étaient très intelligentes et nous aurions continué longtemps si le temps imparti avait été plus long.

Promesse a été faite de nous revoir à la rentrée. Tout porte à croire que l'action a été fructueuse.



Patrick antaŭ atenta publiko

Notre association a terminé l'année scolaire par un stage, le samedi 15 juin de 9h30 à 17h, et par un cours le mercredi 19.

Reprise à la Maison des Associations le 2 octobre.

Contact : 04 92 72 39 89 / 04 86 90 24 97 /
04 92 73 38 14

Mais nos activités n'en étaient pas finies pour autant puisque dans l'après-midi du 29 juin, EKEM-04-Esperanto était présent à "Sainte Tulle en Fête", une fête annuelle à ne pas manquer pour sa bonne humeur, sa diversité et son rayonnement.

Et comme les bonnes idées ne manquent pas à Manosque :

«Je savais par le "Jarlibro" qu'il y a des scouts espérantistes. J'ai voulu en savoir un peu plus, alors j'ai rentré dans Google: «mouvement scout et espéranto».

Il en ressort que Baden Powel, le créateur du scoutisme, conseillait l'espéranto.

Les scouts sont dans le monde 38 millions pour 217 pays. En France il y a 180.000 scouts. J'en déduis que régionalement, chaque groupe espérantiste devrait essayer d'entrer en contact avec le groupe scout le plus proche. C'est ce que va faire le groupe de Manosque. Est-ce une bonne idée ? La suite nous le dira.

pri ĉiuj artikoloj raportis José Grammatico



Eo-budo en Sainte-Tulle

05 - ESPERANTO-GAP

Le dimanche 23 juin, Espéranto-Gap a tenu un stand, à l'occasion de la Fête du Mouvement de la Paix, dans le très beau parc de Charance.

Ce qui m'a frappée : les visiteurs étaient attirés par les albums de Tintin et les feuilletaient volontiers. Une fillette de 10 ans en a emprunté un et l'a lu pendant près d'un quart d'heure.

Albums à ne pas oublier sur vos stands cet été !

informis Monique Arnaud

Projets Grundtvig

Durant les dernières semaines de l'année 2012, j'ai participé à un projet Grundtvig proposé par la Fédération Italienne d'Espéranto (FEI) pour faire connaître et enseigner l'espéranto à Mazara del Vallo en Sicile.

Des revues comme le Monde de l'Espéranto, Espéranto-Info, Esperanto (UEA) ont publié des rapports écrits à mon retour et vous pouvez suivre l'évolution de l'enseignement de l'espéranto dans la ville de Mazara del Vallo en consultant le site www.esperanto.it/cei. Vous y dé-

couvrirez la mise en place d'un projet Comenius pour collégiens et lycéens.

M.A.

L'Union Européenne subventionne des projets très divers, (projets Comenius réservés aux collégiens et lycéens, projets Erasmus pour les étudiants et projets Grundtvig pour l'éducation permanente des adultes).

**«Les partenariats éducatifs Grundtvig sont destinés à promouvoir des projets de coopération de petite envergure, entre au moins trois organismes européens travaillant dans le domaine de l'éducation pour adultes, au sens le plus large du terme.*

Les partenariats éducatifs sont axés sur le processus même de coopération et visent à accroître la participation des structures soucieuses de donner une dimension européenne à leurs activités éducatives. Les partenariats éducatifs sont d'une durée de 24 mois non renouvelables»

Volontariat Sénior a pour but de permettre à des seniors de se porter volontaires dans un autre pays européen pour y pratiquer une activité bénévole sous la forme d'apprentissage informel et mutuel (apprentissage et partage de connaissance) Dans ces projets, les volontaires pourront augmenter leurs connaissances personnelles, linguistiques, sociales et interculturelles, acquérir des compétences spécifiques liés aux activités accomplies. Les volontaires peuvent partir pour des durées de 3 à 8 semaines.

La candidature d'Espéranto-France a été acceptée pour ces partenariats éducatifs, et dans ce cadre elle travaille sur le thème « Education Interculturelle : un défi pour l'Europe de la diversité », avec trois pays partenaires acceptés par leurs agences respectives : L'Alle-

magne, la Catalogne et la Suisse, d'août 2011 à juillet 2013.

Vous aurez un aperçu du travail réalisé à ce jour sur le site www.noos.ch/ideo : ce site rassemble les documents réalisés et décrit les activités du partenariat en cours.

La revue d'Espéranto-France, « Le Monde de l'Espéranto », publie des informations pendant cette année 2013. Le site et autres documents seront produits en 4 langues : allemand, catalan, français et espéranto.

(*les textes en italiques proviennent du site de présentation de l'Agence Europe-Education-Formation France (2E2F) 25, quai des Chartrons 33080 Bordeaux Cedex)

N.F.S. Grundtvig (1783-1872) : Seul éducateur danois de stature internationale, il fut aussi un théologien, un historien et un écrivain qui exerça une profonde influence sur la vie de son pays. Très attaché à la préservation du patrimoine, il défendit ardemment l'éducation des adultes en tant que vecteur de participation sociale et de développement personnel.

13 - ESPERANTO - LA CIOTAT

Kunveno de la federacia estraro



*La federaciaj estraranoj kunvenis ĉe Renée Triolle,
la dimanĉon 1an de Julio,
por debati pri la intaj kaj ontaj agadoj de nia Provenca Federacio.*

Stage

Comme il est de coutume, un stage intensif d'espéranto aura lieu à La Ciotat les samedi 5 et dimanche 6 octobre.

samedi : accueil de 9h à 10h - cours de 10h à 12h et de 14h à 17h

dimanche : cours de 9h à 12h et de 14h à 17h

Repas pris en commun selon la demande des participants.

Pour adhésion ou plus d'informations :

triolle.renee@wanadoo.fr

13 - ESPERANTO MARSEILLE

Tekstoj en Monato

Thierry Spanjaard kaj la grupo de Marsejlo sendis tekstojn al la konata revuo « Monato », pri « Marsejlo, Eŭropa Kultura Ĉefurbo 2013 » kaj pri la « afero Davis Guetta ».

Ĉi-lastaj estis jam publikigita en la revuo. (vidu en la rubriko « La federacianoj esprimas sin »)

83 - ESPERANTO-KLUBO-FREJUS-SAINTE-RAPHAEL

Alain Rémy gastis ĉe *Monique* kaj *Pierrot*...

Komence de Aprilo, nia vojaĝema kaj nelacigebla amiko estis en Saint-Raphaël dum unu nokto, preta foriri sur sia biciklo al plia tut-Eŭropa vojaĝo.

Pezo de lia biciklo kun la pakaĵoj : inter 60 kaj 70 kilogramoj !



Alain, Monique kaj Pierrot

Renkontiĝoj

Ĉu ĉiam belegas la vetero en niaj sudfrancaj departementoj ? Vi bone scias, ke ne, kaj jen pruva foto, farita marborde en *Le Dramont*, proksime de *Saint-Raphaël*, kie kuniĝis la 5an de Majo dudeko da kuraĝaj samideanoj por pikniko en pluva kaj malvarma -sed feliĉe amika - etoso.

Danke al la kutima akceptemo de *Monique* kaj *Pierrot Prezioso*, la tuta grupo povis tamen rifuĝi en ilia hejmo kaj ĝui ne nur varman kafon, sed ankaŭ muzikaĵojn luditajn de *Marité Prezioso* (akordiono) kaj *Nicolas Castillon* (voĉo + gitaro).



parto de la grupo, kiu provis elteni la aĉajn kondiĉojn veterajn

Feliĉe, malagraba vetero neniam daŭras en nia regiono : suno kaj varmo denove regis okaze de la lasta kunveno - antaŭ somera paŭzo certe meritita – en *Les Issambres*, la 23an de Junio.

Ĉifoje, la klubo havis la plezuron akcepti *Thierry Saladin*, kiu, post la komuna tagmanĝo, prezentis al la ĉeestantaro la peticion :

« Esperanto, oficiala lingvo de Eŭropa Unio, nun ! »

(pli da detaloj pri tiu peticio en la rubriko « Diversaj novaĵoj »)



interesa debato inter Thierry S. kaj la ĉeestantoj

83 ESPERANTO LE BEAUSSET

Vizito de Milada kaj Petro Chrdle

Niaj eksterlandaj geamikoj alvenis en *Le Beausset* la 15an de Junio.

Kiel agrablajn momenton ni travivis kun tiuj samideanoj el Ĉekio !

Ĉar Petro estas eldonisto, ni parolis pri lia profesio en lia lando kaj en Eŭropo. Eblas konklude diri, ke estas tre malfacile labori, en ĉiuj Eŭropaj landoj, pro la kapitalisma sistemo.

Pleurcele, ni vizitigis nian regionon al niaj gastoj : kiom da surprizoj ili spertis ! Ili miris ekzemple pri la blua maro, kiun ili neniam vivis !

Por helpi nian lokan klubon, montrante ĝian vigecon, ni vizitis la turisman oficejon ; ĝia direktorino anoncis la tre baldaŭan Esperantan eldonon de la turismaj priurbaj reklamiloj : ege bona novaĵo !

Bedaŭrinde, Milada kaj Petro foriris jam lundon matene al Dijono, sekva vojaĵhaltejo.

raportis Pierre kaj Nicole



Petro ĉe la turismoficejo en Le Beausset

Petr CHRDLE [ĥr-dle], (12a de Marto 1946), nomata Petro, estas ĉeĥa esperantisto, posedanto de la agentejo *Kava-Pech*, iama prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (kaj ekde 2008 ĝia honora membro), rajtigita ekzamenanto de ILEI kaj verkinto de lernolibro *Esperantem za tři měsíce* ("Per esperanto dum tri monatoj") kaj « Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj ».

Li fariĝis docento ĉe AIS en San Marino (kies senata sekretario li estis de 1990 ĝis 1994). De 1987 ĝis 2010, li estis komitatano de UEA kaj en la elektoperiodo 1998-2001 ĝia estrarano respondeca pri faka kaj scienca agadoj.

Lastatempe lia agado estas ligita precipe al la kongresa kaj kleriga agentejo kaj eldonejo Kava-Pech, kiun li fondis en 1992 kaj kadre de kiu li efektivigas ankaŭ Esperanto-agadon (kontaktlingvoj de la agentejo estas la ĉeĥa, Esperanto, la germana kaj la angla).

(el Vikipedio)

Stage

Pour la 2ème fois, le club d'espéranto du Beausset, sous les auspices de la Fédération « Espéranto-Provence », organisera un week-end culturel les 30 novembre et 1er décembre prochains, à la Maison des Frères, avec trois niveaux de cours, un spectacle de chants donné par Franz Mimmersheim et... de bons repas préparés par Pierre Oliva.

Notez bien d'ores et déjà ces dates sur votre agenda !

Bulletin d'adhésion

dans le n° d'automne de cette revue.

84 - CERCLE CULTUREL ESPERANTO D'AVIGNON

KER-ekzamensio

Sabaton la 8an de Junio 2013 okazis, en la Kultura Socia Centro de la "croix des oiseaux" (kruco de la birdoj), en Avinjono, sesio por la Esperanta ekzameno laŭ la Eŭropa referenckadro.

Por tiu dua sesio organizita en la tuta mondo, en Avinjono 5 kandidatoj trapasis la B2 nivelon kaj 3 aliaj la B1 nivelon.

Post aŭskultado de salutmesaĝo de *Katalin Kovats*, Sinjoro *Mickaël Wright*, la nova direktoro de la Centro, disdonis la taskojn al la kandidatoj. Ni faris fotojn kaj je la naŭa precize, ĉiu povis

komenci la laboron.

Dum 2 aŭ 3 horoj, ĉiu klopodis fari sian eblon por bone respondi la demandojn.

Ĵurnalistino vizitis nin. En alia ĉambro, por ne ĝeni, Johanino babilis kun la ĵurnalistino. Antaŭ ŝia foriro, ŝi diskrete fotis la studemajn kaj koncentritajn kandidatojn, kiuj apenaŭ rimarkis tiun ĵurnalistinon.

Kiam ĉiuj redonis siajn respondfoliojn, taskojn kaj eĉ malnetojn, ni tuj faris fotokopiojn de la respondfolioj, en la ĉeesto de du klubanoj kaj de S-ro Wright, la direktoro. La originaloj, kune kun la aliĝiloj, ĉio bone ordigita laŭ la niveloj kaj numeroj, estis lokitaj en koverton. Tiam tiu ĉi estis fermita, subskribita de la ĉeestantoj ; glubendo gluita atestas, ke neniu malfermis ĝin. Mi metis la koverton en alian, kiu foriris al Budapesto lundon la 10an de Junio. La direktoro zorgis pri la alpoŝtigo. Ni metis la kopiaĵojn kaj la malnetojn en apartan koverton, kiun la direktoro konser-

vos en la kiraskesto de la Centro ĝis kiam ni devos detrui tiujn dokumentojn.

Nun, ni atendu sed ni esperas, ke multaj trapa-sintoj sukcesis.

raportis Rose-Marie Quintin



la ekzamenatoj en Avinjono

La federacioj esprimas sin...

... polemike ...

Marsejlo : publika mono donita al privata koncerto !

Marsejlo, en Provenco, (suda Francio), estis elektita Eŭropa Kultura Ĉefurbo 2013. Tiu titolo estas donita al Eŭropaj landoj laŭ regula vico, kaj poste la lando decidas pri la plej taŭga urbo. La decido elekti Marsejlon okazis en Septembro 2008, ĉar la decidantoj pensis, ke pli ol aliaj urboj, Marsejlo bezonos tiun helpon.

En tiu evento, ĉiu decidpova nivelo partoprenas : la programon subvencias la Landa registaro, la Regiona konsilio, la Departementa konsilio, la Marsejla urbo-konsilio, aliaj lokaj administracioj kaj privataj subtenantoj. Konstruado de novaj kaj renovigo de malnovaj muzeoj, ekspozicioj, spektakloj (danco, cirko, teatro), koncertoj ktp. aperas en la programo. Samtempe multaj partoj de la urbo estas renovigataj.

Multaj lokaj artistoj proponis partopreni en la evento, sed ili renkontis du obstaklojn : la decidantoj preferis decidi per si mem, sen engaĝi lokajn artistojn, kaj la organizantoj respondis, ke ili ne havas sufiĉan budĝeton. Multaj interesaj kaj novigaj projektoj ne sukcesis pro manko de publika subteno.

Sed, antaŭ kelkaj monatoj, la urba konsilio

Publika mono por privata koncerto

Tamen arzoŭ kelkaj monatoj la marsejla urba konsilio optinis, ke malkaŝe granda suma koncerto por atingi pli da homoj. Do ĝi decidis subteni koncerton de David Guetta, diskotekisto kreanta en Francio kaj muzik-produktanto, koncerti la turo de 400-000 eŭroj.

Biletaj

Krome ĝi decidis senpage disponigi la parkon Borely (la plej granda parko de la urbo) al ŝia koncerto. Guetta planas koncerti la 25an de junio, kaj la biletaj kostas inter 44 kaj 60 eŭroj.

Do la urbo finance helpas privatan eventon de komerca artisto (se oni konsideras Guetta kiel artiston), promesas senpage vico de la plej granda parko, dum la koncerto estas multkosta por la publiko kaj granda fonto de profito por la artisto.

Ĉiaren sentis scio, kiel la parko estas purigita kaj renovigita post la koncerto. Antaŭ kelkaj monatoj la urba konsilio rifuzis disponigi la parkon al organizanto de tala ciklomanifesto laŭ laŭdo (ŝerz Libere – Libere) amoj, dirante, ke tio difektas la parkon.

Impostpagantaj

Sed al tiuj delinantoj da homoj, kiuj venos al la koncerto de Guetta, ne gravas la urbo (por mono de la impostpagantoj) reordigos la parkon.

Kompreneble multaj lokaj organizantoj koncerti tia (l'occasion de publika mono. Dum ĉiuj tiuj okazigoj, multaj magis. Perokriso estas ĉiokaze post una serĉojn, ĝi okazis jam pli ol 15 000 subskriboj, dum pli ol 28 000 membroj aliĝis al Facebook-grupo (www.facebook.com/groups/368202943287761/) koncerti ĉi subvencio.

Thierry Scazzari
de Esperanto-Marsejlo

Mars 2013

Murdo al urbestro

En la silento, jen paŝantoj sur la ponto super la rivero.

La celo en iliaj pensoj : la urbeto kaj la malamika urbestro, perfida viro, granda, dika, ŝajne afabla sed fakte terure kruela kaj senmorala. Ĉe lia kapo, bluaj malsincere amikaj okuloj, nazo simila al agla beko, buŝo kvazaŭ faŭko de ri-detanta gorilo.

Nun, kvin homoj apud la domo.

Nur minacantaj gestoj en nokta timiga silento. Ekfrapo kontraŭ la pordo. Krioj de vekigitaj virinoj. Malakuta voĉo de la urbestro kaj pafado fare de li.

Nun, nur la virinaj akutaj krioj. Iom poste novaj pistolbruaĵaj pafoj. Denove silento. Poste ploroj.

Sur la trotuaro, mortigita urbestro.
Baldaŭ, neniu sur la urbetaj stratoj.

Venontaj rendezuoj

(sekvo de la listo aperinta en la antaŭa numero de la bulteno)

En nia federacio

Septembro : Asociaj forumoj diversloke (vidu en la rubriko « *El niaj federaciaj asocioj* »)

Septembro : Turneo de Franciska Toubal (vidu en la rubriko « *El niaj federaciaj asocioj* »)

Oktobero 5-6

La Ciotat : intensiva staĝo (vidu en la rubriko « *El niaj federaciaj asocioj* » - *La Ciotat*)

Novembro 30 – Decembro 1

Le Beausset : Kultura Semajnfino (vidu en la rubriko « *El niaj federaciaj asocioj* » - *Le Beausset*)

Decembro 15

Saint-Raphaël : Zamenhof-festo

Marto 9 – 2014

Les Issambres : ĝenerala membro-kunveno de nia federacio, okaze de la M.E.S.

Marto 8/15 – 2014

Les Issambres : Mediteranea Esperanto-Semajno

En Francio

Aŭgusto 10-17 :

Baugé-en-Anjou (49) : Kastelo Greziljono - Teatra Semajno, kun teatro-kurso en Esperanto, Esperanto-kurso pri teatro kaj konversacia kurso, kun dancoj kaj kantoj kaj kun individuaj sesioj pri parfum-elekto, kun 3 vesperaj spektakloj : Farso pri Ukoj, teatraĵo pri Galileo, Kanzonoj en Esperanto...

Vidu <http://gresillon.org/s5>

Lerni kaj praktiki Esperanton ludante, teatrate, en loko ideala por Esperantistoj, estas des pli interese, kiam la gvidantoj estas profesiaj teatristoj el alilando. Georgo Handzlik el Pollando kaj Saŝa Pilipoviĉ el Serbio proponas neforgeseblan momenton de spertiĝo, sed ni estas malkvietaj, ke eble ni devos ĉion nuligi kaj ne venigi niajn du amikojn ĉar ni ankoraŭ ne ricevis sufiĉe da firmaĵaj aliĝoj. Helpe nin trovi amantojn de teatro originala en Esperanto, dezirantajn labori kun profesia aktoro.

adreso: Maison Culturelle de l'Espéranto, Château de Grésillon, St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU, France
telefono: +33-2.41.89.10.34, retadreso: kaste-lo@gresillon.org, retejo www.gresillon.org

Aŭgusto 12-17 :

Bouresse (86): Kvinpetalo - promenado tra naturo kaj Vikipedio kun Alain Favre
Inf. : informoj@kvinpetalo.org
Tel. : 05 49 03 43 14

Somero... 2015

Lille : 100a Universala Kongreso de Esperanto

Ekster nia lando

Novembro 1-2-3

Hispanio : 36a Kataluna Kongreso kaj 1a Okcitan Eo-kongreso

inf. : <http://esperanto.cat/kongresoj/2013/index.php>

Decembro 27 – Januaro 3

Saarbrücken (Germanio) : Novjara Renkontiĝo
inf. : <http://www.esperantoland.org>

*(sekvo de la listo aperinta en
la antaŭa numero de la bulteno)*

En nia federacio

Septembro : Asociaj forumoj diversloke (*vidu en la rubriko « El niaj federaciaj asocioj »*)

Septembro : Turneo de Franciska Toubal (*vidu en la rubriko « El niaj federaciaj asocioj »*)

Oktobro 5-6

La Ciotat : intensiva staĝo (*vidu en la rubriko « El niaj federaciaj asocioj » - La Ciotat*)

Novembro 30 – Decembro 1

Le Beausset : Kultura Semajnfino (*vidu en la rubriko « El niaj federaciaj asocioj » - Le Beausset*)

Decembro 15

Saint-Raphaël : Zamenhof-festo

Marto 9 – 2014

Les Issambres : ĝenerala membro-kunveno de nia federacio, okaze de la M.E.S.

Marto 8/15 – 2014

Les Issambres : Mediteranea Esperanto-Semajno

En Francio

Aŭgusto 10-17 :

Baugé-en-Anjou (49) : Kastelo Greziljono - Teatra Semajno, kun teatro-kurso en Esperanto, Esperanto-kurso pri teatro kaj konversacia kurso, kun dancoj kaj kantoj kaj kun individuaj sesioj pri parfum-elekto, kun 3 vesperaj spektakloj : Farso pri Ukoj, teatraĵo pri Galileo, Kan-

zonoj en Esperanto...

Vidu <http://gresillon.org/s5>

Lerni kaj praktiki Esperanton ludante, teatre, en loko ideala por Esperantistoj, estas des pli interese, kiam la gvidantoj estas profesiaj teatristoj el alilando. Georgo Handzlik el Pollando kaj Saša Pilipoviĉ el Serbio proponas neforgeseblan momenton de spertiĝo, sed ni estas malkvietaj, ke eble ni devos ĉion nuligi kaj ne venigi niajn du amikojn ĉar ni ankoraŭ ne ricevis sufiĉe da firmaj aliĝoj. Helpu nin trovi amantojn de teatro originala en Esperanto, dezirantajn labori kun profesia aktoro.

adreso: Maison Culturelle de l'Espéranto,
Château de Grésillon, St. Martin d'Arcé,
49150 BAUGÉ-EN-ANJOU, France
telefono: +33-2.41.89.10.34, retadreso:
kastelo@gresillon.org,
retejo www.gresillon.org

Aŭgusto 12-17 :

Bouresse (86): Kvinpetalo - promenado tra naturo kaj Vikipedio kun Alain Favre
Inf. : informoj@kvinpetalo.org Tel. : 05 49 03 43 14

Somero... 2015

Lille : 100a Universala Kongreso de Esperanto

Ekster nia lando

Novembro 1-2-3

Hispanio : 36a Kataluna Kongreso kaj 1a Okcitan-
na Eo-kongreso
inf. : [http://esperanto.cat/kongresoj/2013/
index.php](http://esperanto.cat/kongresoj/2013/index.php)


Decembro 27 – Januaro 3

Saarbrücken (Germanio) : Novjara Renkontiĝo
inf. : <http://www.esperantoland.org>

Iom da kulturo... Jules Verne kaj Esperanto

En la numero 91 (vintro 2012/2013) de via bulteno, en la rubriko « Esperanta Kulturo en Manosque », vi povis legi artikoleton pri la verko de Verne : « San Carlos », kunportita de José Grammatico kaj Bernard Greck en la mediateko de Manosque okaze de prelego tie prezentita : « Geografio laŭ Jules Verne ».

Por scii pli pri tiu verko, jen tre interesa artikolo skribita de István Ertl kaj aperinta en *La Ondo de Esperanto*.



verkisto.

Verne promesis al siaj amikoj Tassencourt kaj Delfour dediĉi romanon al la meritoj de Esperanto. Li eĉ komencis ĝin sub la labortitolo *Voyage d'études* (Esplorvojaĝo), kaj roligis en ĝi certan Nicolas Vanoŭ, pasian esperantiston. Sed la 24an de Marto 1905 (kvar monatojn antaŭ la Bulonja kongreso) Jules Verne mortis. La filo Michel ankoraŭ eldonigis dekon da romanoj sub la patra nomo, el kiuj plurajn li mem verkis, uzante nur

“Esperanto estas simpla, fleksebla, harmonia lingvo, kiu taŭgas same por eleganta prozo kiel por harmoniaj versoj. Ĝi kapablas esprimi ĉiujn pensojn kaj eĉ la plej fajnajn sentojn de la animo... Ĝi estas la ideala internacia lingvo”.

Ĉu citaĵo el propaganda broŝuro pionir-epoka ? Ne : temas pri frazoj el la lasta romano de franca verkisto-fantaziulo, kies revoj, kvankam ili plejparte jam plenumiĝis, ĉiam plu revigas la homojn : Jules Verne (1828-1905).

La esperantisteco de Verne estas bone konata almenaŭ ekde 1977, kiam Marcel Delcourt kaj Jean Amouroux artikolis pri “Jules Verne kaj la internacia lingvo” en la revuo *Franca Esperantisto* (nov.-dec., p. 88). Dank’ al ili ni scias ke :

Verne bone konis la internacilingvan demandon, ĉar li amikis kun fervora volapukisto, deputito Raoul Duval. Kiam propaganda prelego de la E-pioniro Théophile Cart, komence de 1903, instigis fondon de Esperanto-klubo en Amiens, la urbo kie Verne vivis, la verkisto tuj akceptis fariĝi ties honora prezidanto, je la peto de la klubestro Charles Tassencourt (negocisto, konsula agento de Usono kaj amiko de Verne) kaj de Joseph Delfour. *Tutmonda Jarlibro Esperantista* de la eldonejo Hachette baldaŭ enlistigis la adreson de la

ideojn kaj motivojn el la postlasitaj manuskriptoj. Tia sorto trafis ankaŭ *Esplorvojaĝon*, kiu inspiris *L'étonnante aventure de la mission Barsac* (La stranga aventuro de la misio Barsac, 1914), romanon sen aludo al Esperanto.

Ĉu ni iam ekscios kion do Jules Verne verkis pri la internacia lingvo? Tion ni povis ekesperi kiam la Pariza eldonejo *Le Cherche Midi* lanĉis sian kritikan eldonserion de Verne-aj manuskriptoj. En Aprilo 1993 aperis ĉe tiu eldonejo la kolekto *San Carlos et autres récits inédits* (San Carlos kaj aliaj rakontoj unuafoje aperantaj) : kvar noveloj kaj du roman-komencoj. La volumo enhavas tiujn 50 paĝojn da *Esplorvojaĝo*, kiuj ja estis verkitaj !

Ni povas nur provi diveni (same kiel Michel Verne per sia *Misio Barsac*) kiel la aŭtoro estus elvolvinta la intrigon. (“Ĝi estas la lasta verko pri kiu mia patro laboris”, – skribis Michel al la eldonisto.) La tempo de Jules Verne sufiĉis nur por kanvasi la romanon. Ni legas pri ekspedicio alvenanta al la kolonio Franca Kongo por determini ĉu ĝiaj loĝantoj estas “politike maturaj” por mem elekti deputitojn en la metropolan parlamenton. Sed apenaŭ ekmarŝas la ekspedicio, la romano interrompiĝas.

sekvonta...

Limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta numero :

20a de Aŭgusto 2013

Bonvolu sendi al : p.vilain83@orange.fr

Antaŭdankojn pro viaj kontribuoj

Espéranto Provence 12